30.gr

3-a Jaro. N-o 144 APERAS  SEMAJNE 2. Julio 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanty

SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

# LA UNUAJ SENNACIULOJ

Ĉu ekzistas *nun* veraj sennaciuloj, eĉ inter SAT-anoj?

Mi dubas. En la nunaj kondiĉoj de kapitalisma sociordo la sennacieca ideo estas nur revo, nur tendenco al perfektiĝo de nia "interna", subkonscia ideologio. Ja eĉ sennaciuloj "perraciaj", tiuj, kiuj klare konscias la tutan abomenecon de naciisma idearo, — eĉ tiuj antaŭenemaj individuoj ofte *sentas* ankoraŭ naciece. Ne riproĉi ilin ni volas, nur bedaŭri la objektivajn cirkonstancojn kaj lukti kontraŭ ili ni devas.

Ĉu, ekzemple, francia laboristo povas senti kaj pensi ne naciece? La alilandaj laboristoj ja amase enmigras Francion, sukcese konkurencas kontraŭ siaj franciaj kunfratoj. Rezulte: malaltiĝo de salajroj, senlaboreco kun ĝia proviza laborarmeo... Tial la francia laboristo preskaŭ ĉiam malame rilatas al la alilanduloj konsiderante ilin kiel ŝtelistojn de lia salajro. Kiu kulpas?...

Kaj tamen sennaciuloj, veraj sennaciuloj jam nun ekzistas. Paciencon! Mi estas pruvonta tion al vi.

Kiam franco parolas pri Germanio, li nur tre malofte diras *allemand* (germano); plej ofte li uzas la vorton *boche* elp. boŝ), per kiu li esprimas sian tutan malestimon kaj malamon al la germana nacio. La "spirito de Locarno" nigrigis jam multe da gazetpapero, sed ankoraŭ ne blankigis la animojn. Kaj tamen... tamen en plej neatendita maniero ĝi manifestis sian ekziston. Ĝoju SAT-anaro! Aplaŭdu al... la francaj legomkomercisto!...

Tio okazis dum lasta ĝenerala striko anglia. Dum tiu tempo la franciaj financoj estis en katastrofa stato. La franko ĉiutage pli kaj pli senvaloriĝadis. Ministerioj ĉiutage ŝanĝiĝadis. La prezoj celis ĉielon. Aroj da usonaj kaj angliaj turistoj profitante la favoran kurzon aĉetadis en Francio ĉion aĉeteblan: vinojn, kastelojn, artaĵojn, virinojn... Malesperigita franca popolo serĉis kulpulojn, koleris kontraŭ la lukse vivantaj alilanduloj profitantaj la francan malfeliĉon. Okazis, ke angliaj turistoj estis batataj en mallumaj stratoj de Montmartre (pariza plezuraĉeja urboparto). Kaj ĝuste en tiu momento ... la legomkomercistoj montris belan ekzemplon de sennaciismo.

Amasoj da freŝaj legomoj estis preparitaj en haveno Calais (elp. Kale) por esti eksportitaj kaj venditaj Anglion. Ho ve! Tiuj nepripensemaj angliaj havenlaboristoj elektis tiun momenton por ekstriki solidarece kun siaj fratoj-ministoj. Kion fari? La legomoj ja putriĝos antaŭ la fino de l' striko!... Sed en Parizo la Laboristaro duonmalsatas pro altaj prezoj de vivnecesaĵoj. Ĉu ne estas nun ĝusta momento por montri sian "amon al patrio", sendante la tutan legomprovizon al parizaj bazaroj, kie ĝi tuj estigus malaltiĝon de prezoj?...

Ne! La legomkomercistoj agis kiel... sennaciuloj! Ili vendis la legomojn al germanaj komercistoj, al tiuj samaj "boŝoj", kiujn ili antaŭe malamis. La "boŝoj" bone pagis. Tiam ja unu germana marko valoris 12 francajn frankojn. Sed ne tio gravas. Ankaŭ ne gravas, ke la infanoj de parizaj laboristoj malsatis. Grave estas, ke la legomkomercistoj franciaj, plenblovitaj per "spirito de Locarno", etendis frate la manon al siaj "boŝaj" kolegoj. Larmojn de feliĉo devas aperigi tiu gesto en niaj okuloj...

Sed ni ŝercis jam sufiĉe. Nun ni serioze konsideru la situacion. La rakontita "legomaĵo" estas certe nur fakteto malgrava per si mem. Sed interesa ĝi estas kiel simptomo, kiel malgrandskala respeguligo de plej konsiderinda faktaro. La kapitalistaro rapide komprenis, ke ekonomiaj interesoj unuigas ĝiajn diversnaciajn prezentantojn. Ĝi komprenis, ke la ekonomia bazo pli kaj pli sennaciiĝas. Kaj la ideologio de l' burĝa klaso sekvas tiun ĉi ŝanĝon de la bazo. La spirito de kapitalistaro sennaciiĝas.

La temo estas tro riĉa. Nin tentas jam la problemo de internaciaj trustoj, tiuj unuiĝoj de diversnaciaj kapitalistoj frate kunlaborantaj, por pli efike ekspluati proletojn. Sed milfoje prava estis la granda maljunulo, Marx! Lia materialisma dialektiko estas senerara: ĉiu ago estigas malan agon kaj io nova rezultas el ilia lukto. La sennaciiĝo de kapitalistaro sur bazo de komunaj ekonomiaj interesoj estigos sennaciiĝon de laborprocedoj, intermiksiĝon kaj pli proksimajn rilatojn inter diverslandaj proletoj, ilian sennaciiĝon ... kaj io nova rezultos el ĉio ĉi: tio estos la sociala revolucio.

*Opi.*

# Semajno el mia vivo

Mi estas 20-jara fraŭlo, senpartia, laboristo-muntisto de telefonoj. Mi laboras en telefona fabriko troviĝanta je 8 kilometroj de l' urbo en kiu mi loĝas. El la pli ol 700 gelaboristoj, laborantaj en la fabriko, proksimume nur 350 loĝas ĉe la fabrikkolonieto; ĉirkaŭe 250 loĝas en apudaj vilaĝoj, kaj pli ol 100 loĝas en la urbo. La vilaĝanoj venas al la fabriko piede, la urbanoj alveturas en vagonaro. Iuj urbanoj, plejparte junuloj, post sia 8-hora labortago lernas. Mi ankaŭ lernas en lernejo por laboristoj. La kurso estas tri-



jara, donante mez-kleron. La lernado estas senpaga, se oni ne konsideras tion, ke dum ĝenerala kunveno de l' lernantoj ni decidis dekalkuladi ½% de nia salajro por "kultura laboro" de l' lernejo-rondetoj, akiro de libroj ktp. Estas iom penige vizitadi la lernejon, sed la lernemo estas pli forta, ol la peno.

Matene je la 6 h. mi ellitiĝas kaj iras al la stacidomo. Je la 8 mi eklaboras. De la 12 ĝis 13 estas tagmanĝa interrompo. La loĝantoj ĉe la fabrikkolonieto tagmanĝas hejme; unuj el la urbanoj kaj vilaĝanoj iras al la komunmanĝejo, aliaj restas tagmanĝi en la fabrika ruĝanguleto, ĉar la komunmanĝejo, bedaŭrinde, ne estas sufiĉe vasta por ke en ĝi povu eniĝi ĉiuj urbanoj kaj vilaĝanoj. Ĝenerale ĉe la fabrikkolonieto ne sufiĉas konstruaĵoj. Sed baldaŭ ĉi maloportunaĵo malaperos, ĉar estas jam konstruataj kvar grandaj domoj kaj unu klubejo.

La tagmanĝa interrompo ne pasas por ni senutile: en la ruĝanguleto ni legas gazetojn, ĵurnalojn, librojn; krom tio ofte okazas lekcioj, raportoj, laŭtlegado, koncertoj de laboristoj-amatoroj muzikantoj, ludantaj per blov- kaj kord-instrumentoj, okazas prezentadoj de "Blua bluzo" — amatora scenej-rondeto. Ĝia celo ne estas prezentado de iuj alt-artecaj dramoj, komedioj, k. s. teatraĵoj, sed nur edukado de laboristoj per prezentado de aktualecaj scenetoj precipe el la loka soci-vivo.

Je la 17 h. mi finas la laboron kaj revenas en vagonaro en la urbon. Je la 18½ mi jam devas esti en la lernejo, por tie pasigi kvar horojn. Oni lernas ĉiutage, krom merkredo — parti-tago, kiam komunistoj-instruistoj kaj lernantoj devas partopreni partiajn kunvenojn.

Je la 23 h. mi enlitiĝas.

Mi havas devon- gvidi esp.-rondeton ĉe la fabriko. Tial lundon mi ne vizitas la lernejon; duan fojon en la semajno mi gvidas la rondeton merkrede. Tiam mi noktas ĉe la fabrikkolonieto. Mi ne povas fieri pri multnombreco de la rondeto: el 19 SAT-aniĝintoj daŭrigas lernadon de esperanto nur 7 Gek-doj. Sed ni esperas per nia praktika uzado de esperanto ekinteresigi pliajn Gek-dojn, kaj nun ni estas konvinkitaj, ke komence de sekvonta aŭtuno, kiam denove komenciĝos klub-laboro, nia rondeto estos pli multnombra kaj forta.

Sabate mi finas la laboron je la 14 h. Nur tiun ĉi tagon mi revenas hejmen dum estas ankoraŭ lume. Mia 6-jara fratineto ĝojas, ke morgaŭ mi ne laboros. El la 5 gefiloj de niaj gepatroj mi estas la plej aĝa.

Ni sepope okupas loĝejon el du ĉambroj kaj unu kuirejo. La loĝejo ne estas tute sufiĉa, kvankam ne multekosta.

Dimanĉon matene mi legas "Sennaciulon", respondas leterojn. Je la 14 h. mi venas al esperantist-kunvenoj, kiuj okazas ankoraŭ merkrede. Intervidiĝinte, akirinte esperantaĵojn, informiĝinte, la Gek-doj disiras. Se okazas labor-kunsidoj de l' komitato aŭ de ĝiaj sekcioj, la kunvenoj estas pli longaj, se tio ne okazas, ni liberiĝas pli frue por amuze pasigi sole liberan vesperon de nia semajno, — ni vizitas teatron, kinon, aŭ aranĝas "familian vesperfeston". Antaŭnelonge tia vesperfesto okazis ĉe ni okaze de l' fino de esperanta kurso: La vesperfeston partoprenis pli ol 30 Gek-doj.

*V. Piskunov*, N.-Novgorod. *5432*

# La unuiĝo de laboristaj fotografistoj de Germanio

Estas fakto, ke unu ĝusta bildo parolas *pli*, ol cent vortoj... La burĝa gazetaro jam delonge uzas la fotografion por siaj celoj. Amaso da ilustritaj gazetoj (plej ofte "neŭtrale objektivaj") sciigas la legantaron pri okazintaĵoj en la tuta mondo. Rimarkinde estas, ke oni ja nur montras tion, kio utilas al la celoj de la eldonantoj.

Sed ankaŭ al la Laboristaro la teknika progreso estas utila. Ilustrita literaturo kaj ilustritaj gazetoj est. legataj pli volonte, ĉar la bildoj pli klare montras la faktojn. En Germanio aperas jam kelkaj semajnaj ilustritaj laboristaj ĵurnaloj inter kiuj la A.-I.-Z. (Arbeiter-Illustrierte-Zeitung = Laborista Ilustrita Gazeto) estas la plej taŭga (ĉirkaŭe 250000 abonantoj).




Montriĝis manko. Dum la burĝaj entreprenoj laborigas armeon da profesiaj fotografistoj uzantaj la plej modernajn aparatojn ktp., la laborista gazetaro disponas nur pri malgranda kvanto da profesiaj fotografistoj. Jen komencas la laboro de la laboristaj fotografistoj. La fotografado, kiu ĝis nun plej ofte estis sporto aŭ amuzo por la amatoro, estas starigata je la servo de la Proletaro; priservi la laboristan gazetaron per bildoj el la ĉiutaga klasbatalo, montri malbonajn flankojn de la burĝa sociordo, malbonajn labor- kaj leĝejojn, ktp

Ĉi motivoj direktis al organizado de laborista fotografista movado. Dum somero de pasinta jaro organiziĝis en Berlin kaj Hamburg la unuaj grupoj kaj baldaŭ sekvis aliaj. Jam en la aŭgusto 1926 aperis la unua gazeto *"Der Arbeiter-Fotograf"* (La laborista fotografisto) kaj nun la juna movado posedas firman bazon: La monate aperanta gazeto instruas la legantojn pri teknikaj k. praktikaj demandoj (krome ankaŭ bildkritikado). Dum la landa konferenco estas ellaboritaj statuto k. laborprogramo. La salutleteroj al ĉi konferenco kaj la diverslandaj delegitoj montris, ke ankaŭ en aliaj landoj sin rimarkigas la laboristaj fotografistoj. En Sovetio ekzistas jam sufiĉa kvanto da bone laborantaj fotokorespondantoj.

Nun ankoraŭ la laborprogramo, akceptita dum la landa konferenco:

"La unuiĝo de la Laboristaj Fotografistoj dum la batalo de la internacia laborista klaso fariĝis necesa, ĉar la kapitalista gazetaro uzas la teknikon de la fotografio per multegaj ilustritaj gazetoj *por politika influo kaj spirita subpremo de la amasoj.*

La taskoj de la unuiĝo estas:

1. Instruado de Laboristaj Fotografistoj.
2. Plibonigo de l' scio kaj arta kompletigo de la Lab. Fotografistoj.
3. Popolklerigado en la senco de l' proletara klasbatalo per plej larĝa bildinformado kaj raportado pri ĉiuj aferoj
   a) el ĉiuj laboristaj sportgrupoj kaj proletaj kulturorganizoj,
   b) loĝejoj,
   c) socia higieno,
   d) laborejoj kaj la laboro,
   e) sanigaferoj kaj servo,
   f) laborista movado.
4. Kreado de arĥivo (gazetoj, libroj, broŝuroj, bildoj) por instruado kaj statistikoj, libro kaj bildokritiko en la asocia organo.
5. Influo de la laborista movado per aktualaj bildraportoj.
6. Plifortigo de la klerigo inter la virinoj kaj inter la laboranta kamparanaro per bona ilustrado de ilia vivo.
7. Kunmetado de certaj lumbildserioj.
8. Kreado de Lumbild-centrejo.
9. Aranĝo de fotografaj ekspozicioj.
10. Internacio fotografa.

*Werner (Essen).*



## La elmigrado el Estonio

Tagon post tago la stato de la laboristoj en Estonio pli kaj pli malboniĝas. Regas senlaboreco kaj tial salajroj en malmultaj ĉi tie restantaj entreprenoj estas tre mizeraj. Profesiaj unuiĝoj preskaŭ ne ekzistas, ĉar ilin severe persekutas la registaro.

Pro tio nun tre disvastiĝas elmigrado. Oni elmigras en Brazilion, Aŭstralion, Sovetion kaj Usonon. Plej multaj elmigris en Brazilion, ĉar tien oni povis esti enveturigitaj senpage, sed post kelka tempo de kreskinta elmigrado la registaro malpermesis ĉi tiun elmigradon. Poste la lavango de elmigrado direktis sin al Aŭstralion. Laŭ statistiko en jaro 1926 la nombro de estonaj enmigrintoj montris ¼ el ĉiuj enmigrintoj esceptante la anglojn.

Antaŭ nelonge en ĉefurbo Tallinn la usona konsulo anoncis, ke estas komencita enskribado de dezirantaj elmigri en Usonon. Ĝis sekvinta tagmezo estis enskribitaj 1500 personoj kaj tiam konsulejo ĉesis enskribadon kaj anoncis, ke elmigrontoj jam sufiĉas por 10 jaroj...

En Usonon kaj Aŭstralion povas elmigri nur personoj havantaj 50 000 ĝis 150 000 mk. Taga salajro de simpla laboristo estas nur 100—200 markoj. Nun grupo da senlaboruloj direktis sin al la registaro kun peto forigi malhelpajn leĝojn pri elmigrado kaj subteni la elmigradon de senlaboruloj. Kompreneble la registaro tiun ĉi proponon ne subtenos. Burĝaj ĵurnaloj jam elkalkulis: se elmigrado tiel daŭros, tiam post 3 ĝis 4 jaroj la tuta, malfacile pere de Ligo de Nacioj ricevita, pruntedonaĵo estos forveturigita kun elmigrantoj. Kaj tial oni diligente serĉas metodon por tute malebligi elmigradon.

Sed laboristoj klare komprenas, ke malbonstato el Estonio nur tiel estus forigita, se... burĝoj mem kune kun sia registaro elmigrus; aliokaze ilin laboristoj devigos forlasi la regadon! *(8218)*

# MAKEDONIO

## La lando de larmoj kaj suferoj

(Fino.)

### La teroro de registaro kaj politiko de asimiligado

Politiko de Belgrada registaro celas asimiligon de makedonoj je serboj. Tiudirekte laboras ĉiuj "popolklerigaj" institucioj, speciale pagataj de la registaro. Estas fonditaj specialaj organizoj kun tia tasko. La sukcesoj "bedaŭrinde" ne estas kontentigaj por la ŝovinistoj, ĉar eĉ plej junaj infanoj demanditaj respondas ke ili ne estas serboj. Kion oni ne povas fari vorte, tion oni faras perforte — la imperialistoj efektivigas siajn taskojn. Malpermesite estas al makedonoj baptadi siajn infanojn per nomoj kiujn ili mem deziras. En la preĝejoj estas pendigitaj tabeloj kun nomoj (ĉirkaŭ 40 sume) prenitaj el nacia kaj eklezia historio de Serbio, kaj devige estas por ĉiuj uzi ilin. Ankaŭ al la plenaĝuloj estas malpermesite, ke lia familia nomo finiĝu per "-ov" kiel la bulgaraj. Ĉiu makedono devas sian familian nomon finigi per "-iĉ", ĉar ĝi estas serba!... Kiel vi vidas, barbaraĵoj, delonge eble forĵetitaj en kulturaj landoj. Malplej granda signo de malobeo estas sufokata terure.

Speciale kiam okazas elektoj, la teroro superas ĉion viditan. Ne estas permesata ia kontraŭ-registara listo. El vilaĝo al vilaĝo iras policistoj kaj ordonas, ke tuta popolo voĉdonu por registaro. Se iu kontraŭe faros, tiam li estos akuzata pri "renverso de la monarĥio" kaj ŝtato. Malgraŭ tiu teroro, dum unuaj postmondmilitaj elektoj en 1920, Makedonio voĉdonis por Komunista Partio Jugoslavio elektinte 19 deputitojn komunistajn.

### La signoj de malobeo kaj ribelo

Kontraŭ tia senleĝa terorismo de serba imperialista registaro, staras heroaj filoj de makedona popolo. Tiel, preninte pafilon kaj bombon, la malriĉaj kamparanoj iras montojn kaj tie renkontas kaj mortpafas siajn subpremantojn. Eposa estas ilia batalo kaj ĝi restos en historio. Dek tiaj herooj batalas surmonte dum kelkaj tagoj kontraŭ tutaj batalionoj da ĝendarmoj kaj soldatoj.

Dum jaro 1923 en Bitolja (Monastira) distrikto estis malkovrita nelegala organizo makedonia kaj kondamnitaj ĉirkaŭ 800—900 kamparanoj. En Ŝtip, Kocâni kaj aliaj apudlimaj urboj estas ĉiutage malkaŝataj tiaj organizoj. La teroron ĉe tiaj okazoj povas ĉiuj K-doj imagi! Tie ne estas elektataj iloj... Nur en unu vilaĝo nomita Gardan, dum 1923 jaro estis meze de vilaĝo, antaŭ la okuloj de iliaj edzinoj kaj infanoj, aĉe mortigitaj 20 vilaĝanoj. Tiajn krimojn helpas speciale fondita kaj pagata organizo ŝovinista nomata

### "Nacia defendo"

Plej nigraj estas la agoj de tiu ĉi organizo. Ĝi mortigas ĉiun, kiu estas ribelema kaj liberpensema.

En apudlimaj lokoj estas organizitaj "flugbatalionoj" de tiu organizo, kiuj bruligas tutajn vilaĝojn. Antaŭnelonge estis bruligita unu vilaĝo, kies peko estis, ke dumnokte venis ribelintaj filoj al siaj patroj, por preni nutraĵon k. a. Ĉi organizo estas financata de ŝtato, sed lastafoje komencis praktiki alian metodon. Ĝi sendas anonimajn leterojn al riĉaj homoj postulante ian monsumon. Se ne — mortpuno... Tiel pasintjare estis surstrate mortpafitaj tri turkoj en urbo Prilep. En Skoplje ankaŭ ricevis leterojn multaj judoj kaj bulgaroj.

### Laborista movado gvidanto de subpremita popolo

En supre priskribita stato, la laborista movado estas tre malforta. Ĝi estas persekutata de ĉiuj flankoj. Sed nun, ĝi prenis ankaŭ la liberigon de Makedonio en siajn manojn. Ĉe la lastaj elektoj jam ĝi ekparolis pri la sendependeco de Makedonio kaj havis gravajn sukcesojn. La makedonia popolo kvazaŭ ekposedis flugilojn. Ĝi nun turnas siajn okulojn al Sovetio kaj tutmonda Proletaro, esperante ke ĝi ne estos forgesita en ĝia batalo por la libero. *Jug. SAT-kor.*

## Mortoj... mortoj...

La ĉiutagaj ĵurnaloj publikigas jenan statistikon, kiu elokvente parolas por si mem. Naskiĝis en Dresdeno dum aprilo 678 infanoj; el ili estas 180 de gepatroj ne edziĝintaj.

Mortis dum la sama monato 587 personoj. El ili 71 en la unua jaro, 80 pro pulmmalsano 50 pro kancero, 18 pro akcidento, *26 mortigis* sin kaj aliaj pro aliaj malsanoj. Evidentaj estas la mortoj de infanoj dum la unua jaro. Per tio ni vidas, oni ne publikigis tion, ke la infanoj en la unua jaro aŭ jam suferis pro mal-

sato, aŭ la patrinoj devis labori ie, iel, anstataŭ zorgi pri siaj infanoj.

La memmortigoj pentras la plej bonan bildon de la mizerego ekzistanta en Germanio inter la ... Laboristaro. Aliflanke oni povas vidi, ke la kafejoj kaj diboĉejoj de la burĝaro estas plenplene okupitaj. Tamen abunda mizerego ...? Jes ... kaj certe ankaŭ estas, ke preskaŭ ĉiuj memmortigintoj estis aŭ laboristoj aŭ maljunuloj, ne plu laborpovaj, aŭ al kiuj oni ne plu povas doni laboron pro ...? Tio estas nur statistiko de unu urbo. Se oni volus publikigi statistikon pri Tutgermanio, la nombro de la memmortigintoj eble centobliĝus. Estus necese, ke la Laboristaro finfine kreu al si sociordon, en kiu ne regas tiaj cirkonstancoj ... Do, Laboristaro tutmonda kuniĝu, renversu la sociordojn kapitalistajn. Esperanto estu la rimedo, kiu kunigos nin, por atingo de ĉi nepra celo.

*Renversemulo E. H. (5827).*



# EL SVEDIO

La 5-an de majo oni okazigis ĝeneralan kalkuladon de la senlaboruloj en Svedio, por ĝuste sciiĝi pri tio: kiom da senokupaj gelaboristoj troviĝas en la lando. Anoncis sin ĉirkaŭ 65 000 senlaboruloj tamen ne ĉiuj senlaboruloj sin anoncis, ĉar certaj formalaĵoj kaj inerteco ĉe iuj detenis multajn, kiuj sin ne anoncis. Kaj se oni alkalkulas la familianojn de la senlaboruloj, la nombro de suferantoj pro senlaboreco estas tre granda.

* * *

En la vico de reakciaj leĝoj, kiujn nuntempe la reakciuloj en multaj landoj kreas kontraŭ la laboristaj profesiorganizoj, ankaŭ la svedia registaro intencis prezenti en la parlamento leĝprojekton kontraŭ la strikrajto ktp., sed pro ia kaŭzo, eble pro la akra kritiko de la laboristaj organizoj, ne estas metita antaŭ la parlamenton ĉi jare la projekto. La registaro enpoŝigis ĝin ĝis alia pli bona okazo. Dezirinde estas, ke ĝi bonvolu por ĉiam enterigi tiun fiprojekton, kiu nur fariĝus nova klasleĝo, se ĝi estus akceptita. *(994)*

## Anarkiista movado en Ĉinio

(Laŭ *Ino)*

Dum la nacia Revolucio multaj anarkiistoj aliĝis al Kuo Ming Tang. Depost la interbatalo de Kuo Ming Tang kun la Bolŝevismo, la anarkiista movado pliviglîĝis. Multaj anarkiistoj propagandas siajn principojn inter la popolo. La popola batalfederacio nuntempe atingis grandan disvolviĝon. Ĝiaj regionaj fakoj kaj la neorganizitaj K-doj decidis tre intense propagandi niajn principojn en kaj ekster Kuo Ming Tang. Nuntempe la Federacio alvokas siajn regionajn fakojn organizi Asocion Anarki-Sindikatisman por studi kaj propagandi ĉi tendencon.

En n-o 3, vol. II de monata gazeto "Popola Batalilo" estis speciale dediĉita al laborista movado kaj aperis en pligrandigita formato. Krom multaj raportoj pri laborista movado tutmonda, ĝi enhavas artikolojn pri historio, principoj kaj taktiko de l' anarki-sindikatismo. La gazeto eldonas nun du librojn dediĉitajn al la sama demando. Unu el ili estas la "Anarki-Komunista Manifesto" de M. Novomirskij, tradukita de K-do Lu Chien Bo; la dua estas la "Ekonomia Determinismo kaj Scienca Anarkiismo" verkita de Lu Chien Bo. La lasta verko konsistas el ses partoj: 1. La ekonomia determinismo kaj scienca anarkiismo"; 2., 3. kaj 4. La eltrovo de maŝino, industria revolucio kaj revolucio sociala; 5. Behaviorismo kaj anarkiismo; 6. Anarkiismo kaj la teorio de idea libero. Aliaj libroj kaj libretoj sekvos.

Krom la Popola Batal-Federacio, ankaŭ la eldonejo "Evangelio de l' Popolo" eldonas sian monatan gazeton kaj nun ĝi aperigis du libretojn. La unua estas "Alvoko al junularo ĉinia" de K-do Tien Ŝin; kaj la dua estas "Evangelio de l' horo" tradukita el franca lingvo[1]). La K-doj el Kuo Ming Tang eldonas semajnan revueton "La Revolucio".

Shanghai, 6. 5. 1927. *Lu Chien Bo.*

Adreso de l'aŭtoro: *Lu Chien Bo,* c/o Mr. *Wos You Ka.,* P. O. Box 1387, *Shanghai.*

[1]) Ekzistas ankaŭ esperanta traduko, el kiu ĝi estas retradukita ukrainlingven kun titolo "Evangelje ĉasu". — *N. de la Red.*

## Rekomendinda libro kontraŭ milito

Ĵus aperis la dua volumo de "Militon kontraŭ milito!" *(Krieg dem Kriege)* en eldonejo ADGB, Berlin S 14, Inselstr. 6 (Germanio). Ĉi tiu libro devus aparteni al libraro de ĉiu laboristo kaj socialisto! Per bildoj (bonaj fotoj) montras la verkisto la "belegan gloron de milito". Ne gloro estas la fino de herooj, sed fimortiĝo, teruro kaj barbareco, jen kion montras la verko de Ernst Friedrich (la aŭtoro). Ĉiu homo legu tiajn librojn! Kaj tiam ĉiu konos la militon; kiel ĝin vidis la batalintoj mem. Same ĉiu vidu, kiel la "sinjoroj" ofte vivadis. La teksto paralela estas verkita kvarlingve germane, france, angle, holande. Ĉiu laboristo-esperantisto sendu peton al la eldonejo kaj verkisto, por ke krom la 4 naciaj lingvoj ankaŭ estu uzita esperanto! Laŭ venko de la socialismo estas malhe'pata denove per la voko "Vivu milito!" Pro tio estu *nia* devizo: "Kontraŭbatalu la militon!" Kaj la nomita libro estas akra armilo en nia batalo. *(1851)*

# El la laborista vivo en germana urbo Chemnitz

(Fino.)

### *Laborista sporto*

depost la revolucio tre evoluis kaj etendis sin sur ĉiujn sportofakojn. Sporto tre allogas la amason. Povas okazi, ke amasego da laboristoj entuziasme partoprenas pilkludan konkuron kaj poste malvarme preteriras revolucian manifestacion. Pli ol ie ajn en sporto minacas troigemo je malprofito de la politikaj taskoj de l' Laboristaro. Sendube korpaj ekzercoj necesas al proleto, sed ili ne okupu la tutan forton kaj tempon de la laboristsportuloj!

### *Proletaro kaj religio*

Pri tio oni bedaŭrinde ne povas diri ĝojigajn faktojn. Malgraŭ la militkrimoj kaj kontraŭproleta agado de la kristana eklezio la laboristoj ne eksiĝas. Nur malgranda parto el ili forlasis la eklezion. Laŭ nuna leĝo sufiĉas simpla deklaro de eklezia eksiĝo ĉe administracio urba, sed oni hezitas. Ankoraŭ pli bedaŭrinda estas la fakto, ke la popolo plejparte plue partoprenigas siajn infanojn je religia instruado en la lernejoj. Sufiĉas simpla deziresprimo de la gepatroj ĉe la koncerna lernejestro, ke ilia infano partoprenu, anstataŭ religia, mondrigardan instruon, sed en Chemnitz nur 10 % el la tuta lerneja infanaro ne plu aŭdas la ekleziajn mensogojn. Precipe virinoj estas la baroj por spirita liberigo. Kial? Ĉar multaj laboristaj edzoj tute burĝece opinias, ke la virinoj estu nur dommastrinoj! Sed ne pensu, ke tial la popolo laborista kredas je dio aŭ vizitas preĝejojn! Tute ne! Nur la tradicia sento kaj la mankanta kuraĝo je novaj vivoformoj detenas ilin de lastaj konsekvencoj.

Sed la nombro de la liberpensuloj, kiuj anstataŭas la ekleziajn solenojn ĉe bapto, edziĝo, enterigo ktp. per pli indaj festoj iom post iom kreskas. Do ne mankas konsolo por la estonteco!

### *Laborista klerigado*

La laboristaj partioj kaj sindikatoj multajn klerigajn kursojn aranĝas, ĉu vespere, ĉu sabate kaj dimanĉe en urbaj kunvenejoj aŭ laboristaj hejmoj sur la kamparo. Ĉi kursoj temas ĉefe pri politikaj kaj ekonomiaj demandoj, sed ankaŭ kulturaj problemoj estas pridiskutataj. Ankaŭ la urba konsilantaro per subvencioj al klerigaj institucioj (popola vespera akademio, popola klerigkomitato k. a.) helpas al proleta edukado. Kompreneble ĉi lastaj ne havas pure proletan, sed ankaŭ pli malpli burĝan tendencon. Ekzistas urbaj lernejoj por laboristoj, kiuj funkcias kiel konsilantoj por lernigi al ili ion pri laborista juro, fabrika scienco ktp.

Ankaŭ multaj lab. kluboj okupas sin pri klerigaj celoj. Ekz. radioamatoroj. Krom teknikaj ekzercadoj ili penas influi la sendstaciojn en proleta senco. Aliaj kluboj celas plibonigi la popolan sanon, sekshigienon (infanlimigon), alkohol-abstinencon, prezentadon de malkaraj, liberecaj spektakloj, k. s. Kantemaj kaj muzikon ludantaj proletoj ariĝis por eluzi ĉi artojn en deca maniero. Mi ne forgesu mencii la esperantogrupon, kiu vigle plugas sian kampon.

*Konsumkooperativo*

nombras ĉ. 30 000 anojn. Lastjara vendsumo estis 11 milionoj da markoj. Kooperativaj butikoj troviĝas en ĉiuj kvartaloj.

*Domkonstruado*

okazas daŭre per laborista kooperativo. Oni konstruigas kutime domarojn konsistantajn el kelkdeko da duetaĝaj dometoj kun komunaj elektra lavejo, ludejo, kunvenejo.

*Proletaj festoj*

kutime tre similas al burĝaj festoj. Drinkado, prezentado de burĝaj sensencaĵoj... Nur malofte, precipe ĉe junulaj festoj, oni sentas novan klaskonscian spiriton.

*Kiel la laboristoj pasigas sian liberan tempon*

Pri tio, kion faras vespere kaj dimanĉe la aktivuloj en partioj, sindikatoj, sportmovado ktp. mi ne bezonas multon diri. Certe vi, kara leganto, scias tion per propraj spertoj.

Multaj okupas sin en siaj ĝardenoj. Multaj ĝardenaroj troviĝas ĉe nia urbo. Ĉiu entenas kelkdekon da ĝardenetoj ĉ. 100—200 kvadratmetrojn ampleksantajn kun ligna dometo. Unu ĝardenaro havas komunan infanludejon kaj — bedaŭrinde — ankaŭ bierejon, kiu tre malbone efikas.

Aliaj dimanĉe migras kamparen kaj sufiĉe granda nombro malbonuzas kaj malŝparas sian libertempon restante en drinkejoj. Senĉesa edukado kaj edukado devas malgrandigi tiun ĉi parton de stultuloj.

Jen mi priskribis iom el la vivo de nia urbo. La raporto ne estas kompleta, sed mi ĝojus, se ĝi iel sukcesis interesigi la alilandajn K-dojn, kiujn mi fratece salutas! (3018)

## Latina alfabeto en Turkmenio

Latina alfabeto en Turkmenio estos enkondukita pli rapide, ol en aliaj turkaj respublikoj de Sovetio, dank' al aro da jenaj objektivaj kondiĉoj:

Malgranda elcento de legoscia loĝantaro faciligas plenumon de tiu ĉi reformo, ĉar amasoj ne devos relerni novan alfabeton; plue, — ne granda kvanto da nacia literaturo permesas reeldoni ĝin sen grandaj monelspezoj. Forestas en Turkmenio ankaŭ influa pastraro kaj forta burĝe-nacia intelektularo, kiuj malhelpus al ŝanĝo de alfabeto.

Speciala Komitato por enkonduko de latina alfabeto kaj Regna Scienca Konsilantaro ellaboris projekton de nova turkmena alfabeto, konsistanta el 31 signoj. La 16. 5. 1927 la projekto estis konfirmita. Tutunia Akademio de sciencoj akceptis ĝin kiel unu el la plej bonaj. En kompilado de la alfabeto partoprenis membro de Turkmenia Regna Scienca Konsilantaro K-do Pocelujevski, — malnova esperantisto kaj SAT-ano 4940.

Instruado de la nova alfabeto ĉi jare komenciĝos en ĉiuj lernejoj, kursoj, teknikumoj ktp. La necesa nombro da instruistoj jam estas preparata. Jen ankoraŭ unu salutinda sennaciiga paŝo.

*S. Bojev, Aŝhabad.*

# SKLAVARO

*L. Vilimek-Zlicansky*

I.

Mateno vekiĝis malproksimoriente kaj el la ĉielruĝo eliĝis la brilanta suno, supozante en sia boneco, ke kiam ĝi ekbrilos kaj disverŝos agrablan varmon sur la tutan malgrandan teron, ĉiuj kreaĵoj akceptos ĝin egalmezure kaj ĉiuj same pri ĝi ĝojos.

Sur granda foirplaco estis tumulto ankoraŭ antaŭ ĝia elirejo kaj jam dum krepusko eniradis ĉi tien silentaj, malgajaj homoj, super kies kapoj estis svingataj rimenoj kaj klakis vipoj.

Ankaŭ aŭdiĝis ĉi tie infana ploro — eĉ ekkrio de plenaĝulo, sed pli da bruo faris aliaj voĉoj:

— Vipobatu lin! — Sklavon! Viposvingu!

— Ne viposvingu lin! — Ne vipobatu! Mi ordonas tion! Antaŭ vespero vi ja povos ankoraŭ tion fari.

Sed — malgraŭ la malpermeso tuŝegis la rimenoj brilan korpon de iu — kaj plorsingulto, ĝemspiro aŭ eĉ kolera ekmurmuro estis al la resonoj.

Tio estis sklavaro.

Venigis ilin vendistoj, kiujn logis la profito kaj aĉetemuloj estis ja sufiĉe multaj.

Duonblindiga suno, lumiganta la foirplacon, ekvidis longajn vicojn de kunligitaj homaj estaĵoj, de blanka kaj nigra koloro, ambaŭ-seksaj — kaj tial ne estis stranga al ĝi tio, ke apud duonnudaj, turmentitaj patrinoj, ankaŭ iris knabetoj kaj sidis malgrandaj, nenion en ĉi tiu eksterordinara vivo komprenantaj infanoj.

Kaj ĉirkaŭ ĉi vicoj kuradis servistoj de la sklavkomercisto kun nodhavaj vipoj en la manoj, klakante per ili super kapoj de timigitaj infanoj de la sklavaro. Plenaĝuloj ne timis ilin, ili kutimiĝis jam al tio kaj bato eĉ pli forta ĉesis efiki la skurĝitajn korpojn.

Krom la servistoj, ĉirkaŭkuradis tie ĉi ankaŭ sklavkomercisto — estro, granda sinjoro, pli granda ol dio, pli potenca ol suno. Lin timis liaj servistoj, kiuj flate trudiĝis al li kiel hundoj, kuŝintaj apud liaj piedoj, atendante petrigarde lian — solan rideton — ĝuste tiel, kiel tion faras la hundoj. Nur la sklavaro ne sopiris lian ekridon. Ili ne avidis ĝin ĝuste tial, ke li malŝatis ilin kiel senvaloran difektaĵon — escepte, ke li povis ilin uzi por laboro sur plantejoj kaj ke per vendo de iliaj vivaj korpoj li rikoltis riĉaĵojn — amasigis brilan oron. Kaj tial — sole pro tio — li kriegis al siaj kanajlservistoj: "Ne viposvingu! Ne vipobatu! Mi tion ordonas!" — Sed por ilin kvietigi, li konsolis ilin per pluaj vortoj: — antaŭ vespere vi ja povos tion ankoraŭ fari.

Vespere — jes vespere — ili kompensos sin sur la restintaj, kiujn li ne povis vendi, ĉar ili jam estis maljunaj, malgrasaj, nekapablaj sklavoj, laboreluzitaj kaj turmentitaj pli ol mulo. Jes, tiuj, taŭgaj nek al laboro, nek al vendo — estas bonaj sub vipo kaj nodo.

Nur tiuj, kies muskoloj brilis pro forto, la vangoj ridis pro freŝeco, malgraŭ tio, ke ili estis skurĝitaj, nur tiuj estis multe vendataj. Ili estis freŝa komercaĵo, al kiu ordinare donis la vendanto kiel aldonaĵon la maljunan, senvaloran, vivan formetindaĵon. Sed al ili donadis li ankaŭ multekostan superpezaĵon — ne senpage — la infanojn, infanojn de blankaj kaj nigraj sklavoj — junajn, maturiĝontajn sklavetojn ...

Do ĉi tiuj estis plej multe aĉetataj, kiam plene tagiĝis kaj la suno lumigis vastan foirejon, kien venadis aŭ surĉevale alrajdante, aŭ lasante sin alporti sur portiloj, dioj de l' oro, mastroj, sklavkomercistoj. Ili estis aĉetataj pro tio, ke estis sanaj, fortaj, muskolhavaj kaj seninteresa sklava rigardo ilia ne faris impreson, ke ĉi tiuj kreaĵoj ne fartis bone, ke ili ne satmanĝis, almenaŭ dum du monatoj antaŭ ilia vendo.

Dum la tuta sunbrila tago daŭris la tumulto, krio kaj kruela marĉando inter vicoj da sunbrunigitaj, al tero klinitaj korpoj, kiuj vespere alvenadis la hejmojn de la novaj estroj, sub aliaj, pli akraj skurĝoj, al novaj manĝujoj, en kiujn oni la nutraĵon al ili donadis kaj komencadis novan laboron, por kiu ili estis "kreitaj".

Ĉe la nova estro ripetiĝadis la sama vivo kiel ĉe la malnova. Kiam ili plej multe laboregis, estis pleje vipobatitaj kaj malpleje nutrataj. Sklavo estas ĉiam por labori, ne por manĝi. Sed kiam la estro vidis, ke sklavojn li plu ne bezonas, li komencis ilin indulge trakti, nutri ilin per pli satiga manĝaĵo — kaj post iu tempo forkondukis ilin ree tien, kie li ilin akiris, al la foiro ... Tradukis *M. K.*

(Daŭrigota)

# SENNACIULA RADIO-PAĜO

## La programo de SAT-Radio-Sekcio

Dum la leningrada kongreso estis decidita starigo de SAT-Radio-Sekcio, ĝia provizora gvidantaro estis elektita kaj... Pardonu! Tiu vorto "kaj" estas tute superflua, ĉar nenio plue "kajis". La Sekcio malagas, kvazaŭ ĝi estus unu el tiuj sennombraj burĝaj "societoj", kiuj estas *ial* fondataj, havas neniajn taskojn kaj mortas antaŭ sia naskiĝo. Tamen la Radio-Sekcio de SAT havas taskojn, taskojn tre gravajn por la ĝenerala sennaciiga laboro. Ĉi tie mi penos plej koncize, nur per aludoj pensigaj, skizi la eventualan laborprogramon de l' Radio-Sekcio. Tio ĉi ne estas programo plenumota de la sekcigvidantoj. Ne! Ĉi tie simple estas montrataj vojoj, kiujn povas sekvi ĉiu SAT-ano-radiisto. Sisteman programon kun artikoloj, paragrafoj, subparagrafoj, punktoj ktp. ellaboru la komitato de l' Radio-Sekcio mem.

Laŭ mia opinio la laboro de SAT-radiistoj devas celi:

1. Sennaciecigon de radiodisaŭdigoj.
2. Radiistigon de SAT-anoj kaj de laboristoj ĝenerale.
3. SAT-anigon de radiistoj-laboristoj.

Mi klarigu. La nunaj programoj de radiodisaŭdigoj de la pliparto el la ekstersovetiaj sendiloj estas tute kontraŭaj al SAT-spirito: religiaj predikoj, diservoj, paroladoj de ministroj pri naciecaj temoj, ludado ĉefe de naciaj muzikaĵoj, nur malofte de eksterlandaj komponistoj. Per protestleteroj, gazetartikoloj, manifestacioj oni atentigu la Laboristaron pri tiu ĉi danĝera flanko de radiodisaŭdigoj.

Sed necesas *krei grandan proletan radioaŭdantaron,* kiu povu dikti sian volon al la disaŭdigaj societoj. Por tio oni devas *propagandi Radion* inter laboristoj, *vulgarigi sciojn* pri ĝi, instrui konstruadon de *malkaraj Radio-riceviloj* (ŝajnas, ke en ĉi rilato la okcidentaj radiistoj povus multon ellerni ĉe siaj sovetiaj kunfratoj). Sed varbante laboristojn al radio, oni ilin samtempe SAT-anigu, montrante al ili la grandan sennaciigan signifon de radio, oni ilin esperantigu, pruvante la necesecon de internacia lingvo por radio, "kies ondoj nek pasportojn, nek landlimojn konas".

Plej facile estas radiistigi la plej konsciajn laboristojn, — SAT-anojn. Tial oni komencu per tia interna propagandlaboro. En ĉiu SAT-ĉeleto, inter kies anoj troviĝas radiisto, li faru propagandon kaj instruu pri radio.

Aliparte oni ne malatentu laboristojn jam radiistiĝintajn. Oni SAT-anigu ilin individue kaj kolektive en laboristaj radio-kluboj.

Fine, dum la SAT-radio-movado ankoraŭ ne fortikiĝis, oni profitu la ekziston de neŭtralaj esperantistaj radio-organizoj. Tiel, ekzemple, la leningrada kunsido de SAT-Radio-Fako ĝuste decidis reciprokan helpon kun la Internacia Radio-Asocio; parizaj SAT-anoj, ekzemple, ofte partoprenas kunsidojn de la neŭtrala *Radio Club Esperantiste de France*...

Jen kia estas mia persona opinio tro rapide skizita. Mi volus, ke K-doj eldiru la sian. Ĉu ili aprobas la programbazon ĉi supran? Kion ili trovas en ĝi ŝanĝinda, foriginda aŭ aldoninda?

Alo! Mi aŭskultas!... *E. A. (2043)*

*

## Finfine la televidado estas realigita!

La televidado, t. e. vidado je distanco de objektoj kaj vivantaj estaĵoj, eĉ moviĝantaj, estas nun praktike solvita problemo.

Oni ne konfuzu du esence diversajn aferojn: la telefotografadon kaj la televidadon. En la unua temas ja nur pri kvazaŭa "kopiado je distanco" de senmovaj (almenaŭ ne ŝanĝantaj sian aspekton) bildoj, dokumentoj, fotografaĵoj ktp. Tiu ĉi "kopiado je distanco" necesigas ian tempon dependantan de la grandeco de la kopiata surfaco, de la precizeco kun kiu oni volas ĝin kopii kaj, memkompreneble, de la uzata sistemo (ĉar ekzistas multaj praktike uzataj sistemoj de telefotografado). Tiel, ekzemple, vi povas eniri en Lyon'an poŝtejon, stenografe skribi grandan leteron sur malgranda peco da papero kaj post kvin minutoj en pariza poŝtejo ĝi estos precizege rekopiita. Tio kostos eĉ al vi malpli kare, ol telegramo! Vere temas ĉi tie pri perfadena komunikado, sed la sama procedo povas esti uzata ankaŭ por senfadena telefotografado. La problemo estas jam delonge praktike solvita (la unuaj laboroj jam klare montrintaj la nun uzatajn principojn estis faritaj en 1847 de Blakwell). Nun la gazetoj, bankistoj, komercistoj k. s. tre ofte uzas por siaj bezonoj la telefotografadon. Eĉ la sovetia radio-amatora gazeto *Novosti Radio* (Novaĵoj de Radio) priskribis en siaj kelkaj lastaj numeroj, kiel oni povas memkonstrui tre malkaran radio-aparaton por bildricevado.

Sed nur lastatempe la scienculoj kuraĝis ataki pli malfacilan problemon: la televidadon. Lastjare multaj el ili jam sentis sin tute proksimaj de l' celo kaj vera konkuro estiĝis inter ili. Ĉiu penis realigi la aferon antaŭe, ol lia najbaro. Certe la naciismaj sentoj ludis en tiu paca batalo gravan rolon. Bird en Anglio, Belin en Francio, Karolus en *Telefunken*-Kompanio en Germanio, *Bell Telephone Company* en Usono kaj multaj aliaj rapidis al celo. Ĉiutage la ĵurnaloj informadis pri la "fina solvo de l' problemo pri la televidado" kaj pentradis la belajn bildojn de l' estonteco, kiam ni povos vidi nian pertelefonan kunparolanton, vidi kaj aŭdi teatro- aŭ kino-prezentadon ... sidante hejmen ... Sed la eksperimentoj pruvadis, ke la afero ankoraŭ ne estas finarangita.

La 7-an de aprilo 1927 en Usono estis publike montrita procedo fine solvanta la problemon. Ĝin ellaboris tuta aro da inĝenieroj de l' *American Telephone Company* kaj de la riĉaj laborejoj de *Bell Telephone Company.* Precipe dankinda estas la fizikisto Herbert E. Ives, konata per siaj esploroj pri optiko kaj elektro, filo de Frederic E. Ives, la eltrovinto de l' procedo de fotokliŝado (per kiu estas nun eble doni rapide fotografaĵojn en ĵurnaloj; ankaŭ *Sennaciulo* uzas ĉi tiun procedon).

Neniel intencante malgrandigi la meritojn de la inĝenieroj, ni tamen rimarkigu, ke propradire ili ne eltrovis ion principe novan, sed nur sukcesis finaranĝi aparatojn bazitajn sur la jam konitaj fundamentaj principoj.

Gravas tamen la fakto, ke *nun oni fine povas vidi je distanco.* Tio estas mirindega venko de scienc-tekniko! Kion dirus niaj praavoj, se ili povus ĉeesti la memorindan kunsidon okazintan la 7-an de aprilo posttagmeze en New-York. Dum tiu ĉi kunsido la usona ŝtata sekretario Hoover parolis el sia ministeria kabineto *en Washington* kun s-ro Walter S. Gifford, prezidanto de *American Telephone Company,* kiu troviĝis en la salono de la kunveno.

S-ro Gifford havis antaŭ sia telefonaparato malgrandan ekranon sur kiu li konstante vidis sian kunparolanton kaj povis observi ĉiujn liajn movojn kaj gestojn.

Post kelkminuta interparolado s-ro Gifford petis s-ron Hoover diri malgrandan paroladon al la ĉeestantaro kaj post la jesa respondo, la ricevo estis transportita sur pli potencajn aparatojn. Tiamaniere post kelkaj minutoj la ĉeestantoj povis vidi s-ron Hoover sur granda ekrano kaj aŭdi lian voĉon el laŭtparolilo. La videbleco estis perfekta. Ĉiu movo de vizaĝmuskoloj estis klare videbla.

Post la parolado de s-ro Hoover, por montri, ke la sama procedo povas esti uzata ankaŭ *senfadene,* oni finis la kunvenon por senfadena transdonado koncerto el la stacio de l' *American Telephone and Telegraph* en Whippany. Sur granda vitra ekrano oni klarege vidis la muzikistojn kaj la laŭtparoliloj ĉarmadis la ĉeestantojn per la plej negra muziko.

Tiamaniere estis bonege pruvita la ebleco de praktika "Televidaŭdado".

*Flipps Balanced.*

*

## Praktikaj konsiloj

Neniam tuŝu detektoran kristalon per fingro. Plej malgranda kvanto da graso malfunkciigas ĝin.

* * *

Estu ĝentila en etero! Ne fajfu trokuplante la reakcibobenon. Vin ja tiamaniere fajfigas ankaŭ la ricevilon de via najbaro.

# TRA ESPERANTIO

## ESPERANTO EN "A-I-Z"
### (LABORISTA ILUSTRITA GAZETO TUTMONDA)

*Ĵus aperis unua n-ro de "Laborista Ilustrita Gazeto Tutmonda" kun klarigoj de la bildoj en esp-o. La "AIZ" estas la plej bona kaj plej valora ilustrita gazeto laborista en tutmondo. Sed ĝi nun nur prove aperas kun esp-subskriboj. Ĉu tio restas por ĉiam, tio dependas sole de la esperantistaro. Eldonkvanto de "AIZ" nun estas jam kelkaj centmiloj. Kian signifon de tiu nova formo de "AIZ" havas ankaŭ por nia movado tutmonda, certe tion ĉiu K-do mem povas tre bone imagi. Nia devo nun estas, zorgi por plej vasta disvendo de "AIZ" en ĉiuj landoj.*

*Ĉiu K-do tuj ekkolektu abonantojn por "AIZ" kaj mendu la "AIZ" kolektive (adreso sube). Se ĉiu K-do almenaŭ kolektos 10 abonantojn, kio tutcerte por plej multaj K-doj estos tre facila, tiam ni pruvos al Red. de "AIZ", ke la nova formo de "AIZ" estas granda progreso por ĝenerala laboristmovado tutmonda, kaj samtempe ankaŭ nia tutmonda esp-movado estos grave antaŭenpuŝata. Do, ekagu! Pri abonkondiĉoj tuj interrilatu kun "AIZ" mem, skribu en esp-o al ĝi. Unuopa abono monata kostas (ekster Germanio) 1.20 mkg.*

---

*Adreso de "AIZ" estas: Neuer Deutscher Verlag, Willi Münzenberg, Wilhelmstr. 48, IV, Berlin W 8 (Germanio).*

---

### RUĜA HELPO GERMANIA
(Rote Hilfe Deutschlands)

*Dankas al ĉiuj laboristaj kaj esperantistaj grupoj kaj ĉeloj, kiuj sendis salutleterojn kaj -telegramojn dezirantajn bonsukceson al la II. Tutgermania Kongreso de Ruĝa Helpo.*

*Specialan dankon kaj saluton al jenaj grupoj:* **Laborista Klubo de teksistoj, Naro Fominsk, Moskovsk. gub. (K-do?) Oficejo por peresperanta korespondado de l' Kremenĉuga Sindikata Soveto (K-doj Izgur, Kolĉinski); Lab. Esp. Grupo Nowawes, (K-do Schulze); Loka Mopr kaj SAT grupoj Bourges, Francio (K-do Milleuieux); Lab. Esp. Grupo Paris; Telegramsendintoj el Sebastopolo; SAT-grupo Mannheim (K-do Fredo Beck); kaj aliaj.**

*Jen la respondo de Centra Komitato de RHG:*

**Karaj Gek-doj!**

**Viajn salutleterojn al la II-a tutgermania Kongreso de "Ruĝa Helpo Germania" ni ricevis kaj konigis ilin al la kongresdelegitoj.**

**Pri via intereso por niaj taskoj ni tre ĝojas kaj esperas, ke ankaŭ estonte estos eble al vi subteni la agadon de Ruĝa Helpo en trafa maniero. Por vi kiel esperantistoj havas specialan intereson sciigi pri la fakto, ke la salutleteroj en esperanta lingvo faris la plej etan malhelpon dum tradukado ĉar la enhavo de la leteroj eĉ de ne-esperantistoj laŭsence povis esti komprenata. La laŭvortan tradukon de la salutskribaĵoj faris volonte Berlina Lab. Esp. grupo tiel, ke ankaŭ per tio ni ricevis pruvon de la ligiteco de la esperantistoj kun Ruĝa Helpo."**

*Mi petas konigi ĉi respondon de la Ruĝa Helpo Germania al ĉiuj simpatiantaj lab. grupoj kaj organizoj.*

Willi Vildebrand, *Berlin.* (483)

---

**Daŭrigu la varbadon por Sennaciulo!**

---

### TRA LA MOVADO
(Kroniko)

En Hungario, plej reakcia lando, la esp-a lab. movado bonege progresas. La 13-a jarkunveno de Hung. Esp. Soc. Lab-ista okazis la 8. 5. 27 en Budapest. 68 delegitoj el 24 lokoj partoprenis ĝin. Oficiale salutis senditoj de Soc.-Dem. Partio, Intersindikata Konsilantaro, diversaj grandaj sindikatoj, lab. societoj de alkoholkontraŭuloj, Infanamikoj, Naturamikoj, Federacio de lab. ĥoroj ktp. El la raportoj rezultas, ke malgraŭ la persekutoj de la polico k. de la ŝtataj institucioj, la societo estas nun unu el la plej fortaj hungariaj kulturorganizoj. Jen parolu la ciferoj pri la stato k. pasintjara evoluo de la societo: Membronombro estas 947 aktivaj, 468 subtenantaj membroj k. 38 subtenantaj organizoj en 23 grupoj kaj 34 lokoj de Hungario. La membraro plialtiĝis en 1926 je 30 %. En 1926 okazis 113 elementaj k. 13 progresigaj kursoj kun 1819 partoprenantoj. Estis aranĝataj 23 propagandaj prezentadoj kun 4100 partoprenantoj k. 7 ekspozicioj kun 2400 vizitantoj. Estas disdonitaj 3600 flugfolioj k. disgluitaj 200 afiŝoj. Aperis 95 artikoloj en 25 diversaj gazetoj. La bibliotekoj enhavas 1660 librojn, kiuj estis uzataj 2006-foje. Bone parolas la lingvon en la societo 532 membroj, iom parolas 415 membroj. La societo akiris por si en la pasinta jaro novan hejmon, kiu troviĝante en mezo de la urbo k. konsistante el tri kontorĉambroj k. kunvensalono, ebligas la konstantan, regulan laboradon de salajrata oficisto. La Sportfako partoprenis pasintjare la grandajn laboristajn festenojn. La administracion trafis 1209 alvenintaj leteroj k. estas forsenditaj 1663 korespondaĵoj. Krom la pasintjara subvencio, Budapesta komunumo ankaŭ por ĉi jaro voĉdonis al la societo 1200 pengojn. La Centra kaso de la societo enspezis 5850 pengojn, kio montras kreskon de ĉ. 150 %. La librovendejo, kiu enspezis pasintjare 7514 pengojn, eldonis krom leterpaperoj kaj kovertoj poŝtkartojn, sigelmarkojn por propagando, ankaŭ gramatikon por komencantoj, novan poemaron de Julio Baghy k. estas nun eldonata granda 370 paĝa Hungaro-Esperanta vortaro.

Tre gravas atenti, ke la elementajn kursojn sekvu progresigaj, kiel tion faris la hungariaj K-doj. Pri malfermo de elementaj kursoj venas multegaj informoj: Salzburg (10 pers., instruas K-do Reiter laŭ "Petro"), Krasnoufimsk (100 p., instr. K-doj Birjakov, Juŝmanov, Korjakovcev), Dnepropetrovsk (3 grupoj), Vjatka (2 grupoj, 25 p.), Sebastopolo, Lodz (35 p., instr. K-do 7075 laŭ "Petro") ktp. Tamen nemultaj estas sciigoj pri superaj kursoj. En Tver 25. 4. 27 finis ŝtatajn instruistajn kursojn 9 Gek-doj (instruis K-do Kondrackij, administrinto K-do Varankin); pedagogiaj kursoj funkcias ankaŭ depost tri monatoj en Sebastopolo. Sed en multaj urboj estas sentata manko de spertaj instruistoj (ekz. en Krasnoufimsk).

Kiel ĉiam, treege helpas la propagandon eksterlandaj esp-aj leteroj. Dank' al ili esp-o havis brilan sukceson en la Tutgermania Komjunulara Tago en Hamburg, kiun partoprenis kelkmil gejunuloj. Estis ricevitaj 36 leteroj, 9 fotoj k. 3 murgazetoj esp-aj el Sovetio (sole el Kremenĉug sendis 6 K-doj); 4 el tiuj leteroj estis enpresitaj en "Hamburga Popologazeto". En Krasnoufimsk ĉe distrikta komitato de komjunularo estas fondita fako de Labesko. Same en Smolenska regimento la eksterlandaj esp-aj leteroj altigis por ruĝarmeanoj la aŭtoritaton de esp-a rondeto. En Minsk dum "Tago de Sovetia Laborista Gazetaro" en multaj gazetoj aperis artikoloj pri Labesko k. leteroj de eksterlandaj K-doj. En Vjatka la loka gazeto regule uzas servojn de SAT-aparato, enpresante leterojn el eksterlando.

Plej bone oni eluzas la leterojn ne nur enpresante ilian tradukojn en gazetoj sed ankaŭ aranĝante per ili ekspoziciojn. En Mariinsk tia ekspozicio estis organizita dum "Tago de Sovetia Laborista Gazetaro". En Vjatka — dum publika vesperfesto (propagandaj paroladoj de K-doj Flejs k. Smirnov, koncerto). Dum XI. Distrikta Komjunulara Konferenco en Dnepropetrovsk 7.—12. 5. 27 estis aranĝita ekspozicio de komjunulara k. laborista korespondado; ĝin vizitadis ĉiutage ĉ. 300 p.; dum solena kunsido estis tralegitaj 4 salutleteroj el Germanio; rezulte —kurso organizita ĉe Distrikta Komjunulara Komitato. En Ammendorf ap. Halle dum naturamika ekspozicio 30. 4.—8. 5. 27 estis starigita esp-a anguleto; ĉiu el la multnombraj vizitintoj ricevis flugfolion. En Krasnoufimsk 3. 4. 27 estis ankaŭ farita granda ekspozicio sekvita de regiona esp-ista konferenco, suminta rezultojn de la vintra laboro. Estis elektita regiona komitato (adr.: Rajkom VLKSM, al K-do Korjahovcev). Simila konferenco partoprenita de ĉ. 60 K-doj okazis 4. 4. 27 en Kurgan. Ĝin salute alparolis reprezentantoj de multaj partiaj k. klerigaj organizoj. Post raportoj estis elektita komitato (K-doj Sokolov, Zirjanov, Batrakov, Spiĵarskij k. Nemirov).

Konklude ni kredas, ke la K-doj estas pravaj organizante ekspoziciojn plejparte dum *ne speciale esp-aj* kunvenoj, ekspozicioj, festoj konferencoj. Ilian ekzemplon imitu aliaj! Same imitinda estas organizado de regionaj esp-istaj konferencoj ebligantaj spertinterŝanĝon k. havantaj plej ofte bonan propagandan efikon.

*(Kompilite laŭ multaj leteroj.)*

# ✯ DIVERSAĴOJ ✯

**RUHR-REGIONANOJ!**

Dimanĉe la 3. VII. 27 okazos en Essen distrikta konferenco de LEA. Ĝi komenciĝos je la 14-a h. (2-a ptgm.) en "Gewerkschaftshaus", Kastanienallee. Matene je la 9-a renkontiĝos la partoprenantoj de komuna ekskurso al Ruhrvalo. Ĉiuj proletaj esp-aj grupoj (ankaŭ ne LEA-grupoj) kaj izolaj lab.-esp-istoj estas invitataj partopreni. Montru vian solidarecon kaj deziron helpi al laboro en nia regiono. Sciigu (se tempo sufiĉos) vian alvenon al Aug. Schwenk, Essen, Engelbertstr. 21, IV.

*

**AL SAT-ANOJ-KOMUNISTOJ**

Por definitive pruvi al gvidantoj kaj membroj de Komunista Partio en Lyon, ke nia propagando kaj laboro estas nek frenezaĵoj, nek sensencaĵoj, sed jam utilas al laborista klaso, la komunista frakcio de Lyonaj SAT-anoj decidis organizi specialan kunvenon rezervotan al kompartianoj, kiu okazos meze de julio. Iu komunista SAT-ano parolos pri esperantista movado rilate komunismon. La celo de tiu grava kunveno estas atentigi lyonajn komunistojn pri SAT kaj ĝia VII-a kongreso kaj forigi el ilia pensado ĉiujn severajn kaj neĝustajn opiniojn pri neseriozeco kaj nebezono de esperanto en laborista batalo.

Estos aranĝita ekspozicio de esperantaj ĵurnaloj, revuoj, dokumentoj, libroj, ktp. kaj de komunistaj ĉiulandaj organoj. Ni petas SAT-anojn sendi al ni numeron de sia fabrika, loka aŭ landa partigazeto, kaj plie klopodi en sia respektiva ĉelo aŭ regiono, por ke salutleteroj estu al ni esperantlingve sendataj.

Ĉion direktu al K-do *M. Roux*, 90, rue Boileau, *Lyon VI* (Francio).

Ankaŭ informu tiun K-don pri faktoj atestantaj la utilecon de esperanto por Komunista Partio. Nur citu verajn ekzemplojn, ĉar la paroladanto ilin sciigos en sia lekcio.

*

**AL SAT-ANOJ-OFICISTOJ**

Kiel ni jam sciigis, la nacia kongreso de l' Federacio de Franciaj bank- kaj komercoficistoj (el Ruĝa Internacio) okazos la 15. kaj 16. de aŭgusto en Lyon. En la tagordo, kiu enhavas tre interesajn punktojn, troviĝas la demando pri internacia sindikat-unueco.

La Federacio estos oficiale reprezentata ĉe la VII-a kongreso de SAT; interŝanĝe SAT-anoj-oficistoj el ĉiuj sindikataj tendencoj devos elekti delegitaron por la federacia kongreso.

Mi do alvokas ĉiujn SAT-anojn-membrojn de oficistaj sindikatoj. Sciigi sian alvenon en Lyon kaj, se ili ne povos ĉeesti la VII-an, almenaŭ sendigi de sia organizo esperantan salutleteron.

Respondos al ĉiuj petantoj: K-do *M. Roux*. 90, rue Boileau, *Lyon VI* (Francio).


**LINGVAJ RESPONDOJ**
(Plena Kolekto)

Unu volumo in-8, 92-paĝa **1.— mk. g.**

Multfoje petoj estis faritaj al D-ro Zamenhof, ke li klarigu kelkajn gramatikaĵojn aŭ lingvistikajn demandojn. Ĉiam li respondis bonkore. Pli ol 100 respondoj estis tiel faritaj de li, kaj estis iom post iom publikigitaj en *La Esperantisto* (1889—1893); *La Revuo* (1906—1908); *Oficiala Gazeto* (1911 — 1912). Ili aperas nun en tiu verko logike ordigitaj kaj kun devenaj referencoj. Kvankam ili devas esti konsiderataj kiel oficialaĵojn, laŭ deziro de Zamenhof, konfesinde estas ke ili multe utilas al legantoj.

**Havebla ĉe Administracio de SAT.**


**ENHAVO:**


**La unuaj Sennaciuloj,** de Opi . . . pĝ. 1
**Semajno el mia vivo,** de Piskunov . „ 2
**La unuiĝo de laboristaj fotografistoj de Germanio,** de Werner . . . . „ 2
**La elmigrado el Estonio,** de 8218 . . „ 3
**Makedonio** (fino), de Jug. SAT-kor. „ 3
**Mortoj . . . mortoj,** de 5827 . . . . . „ 3
**El Svedio,** de 994 . . . . . . . . . „ 4
**Anarkiista movado en Ĉinio,** laŭ Ino „ 4
**Rekomendinda libro kontraŭ milito,** de 1851 . . . . . . . . . . . . „ 4
**El la laborista vivo en germana urbo Chemnitz** (fino), de 3018 . . . . . „ 4
**Latina alfabeto en Turkmenio,** de Bojev . . . . . . . . . . „ 5
**Sklavaro** (daŭrigota), trad. M. K. . . „ 5
**Sennaciula Radio-Paĝo** . . . . . . „ 6
**Tra Esperantio** . . . . . . . . . „ 7
**Diversaĵoj, anoncoj** . . . . . . . „ 8



**A-I-Z (LABORISTA ILUSTRITA GAZETO TUTMONDA)**

estas la sola ilustrita gazeto, kiu raportas plej aktuale kaj objektive pri okazintaĵoj en la tuta mondo. La teksto estas germanlingva, sed

de nun ĝi konstante aperas ankaŭ kun esperanta teksto sub la bildoj.

**A-I-Z**

aperas ĉiusemajne kaj estas malmultekosta, bonega, interesa, instrua, eduka kaj samtempe amuziga. // Ne preterlasu la momenton, senprokraste mendi senpagan provekzempleron ĉe:

**Neuer Deutscher Verlag, Berlin W 8, Wilhelmstr. 48**

Atentu anoncon en sekvanta n-ro de "Sennaciulo", en kiu ni publikigos la filiojn de A-I-Z en diversaj landoj, kie vi ankaŭ povos mendi ĉi-gazeton.

ONI KORESPONDAS ESPERANTE


Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)